P A C O   kaj   J U S T E C O.

1947

Monata revuo de la grupo B r u g g e.

Sekcio de Flandra
Ligo Esperantista.

. Prezidanto : Drs F. Roose-J.&M.Sabbestr.I2-Brugge-Tel.3I98I .
. Sekretariejo : Roose-De Kersgieter, J. & M.Sabbestr.I2,Brugge .
. Propagando : Maertens Grég., Nieuwstraat, 54, Assebroek .
. Poŝtkonto : 29I429 - Maertens Grég. Assebroek.

## LA RAJTOJ DE LA HOMO.

(Prof.G.Verbeke)

Tradukis el Nederlanda lingvo :Et.De Baets)

(kun afabla permeso de la aùtoro kaj de la literatura revuo "Dietsche Warande en Belfort" kie la artikolo aperis)

La malkovraĵoj pri la vivo kaj la torturadoj en la punkampejoj de Germanujo kaùzis en la tuta mondo senton de indigno kaj abomeno. Dum la rakonto de la tuta teruro, kiu okazis tie, oni vere havas la impreson ke ni troviĝas antaù la disfalo de centjaroj de kulturo, ĉar la plej fundamentaj valoroj de la homa civilizacio ne estis respektataj. Ĉu tamen estas vere ke "Der Untergang des Abendlandes", kiun antaùvidas Spengler ne estas tre malproksima ? Kiel eblas ke tiu konstruaĵo firme restu, ĉar ĝi apogas sur disŝiritaj fundamentoj.

La plej granda parto de la homoj tial klopodis lokigi tiun malvirtfenomenon, kvazaù la infekto estus limigita, nome en la naci-socialisma Germanujo kaj nur ekestis dum la nenormalaj cirkonstancoj de tiu milito. Germanujo do estus la unika lando, kie la respekto por la homa persono iom post iom estingiĝis pro influo de la faŝisma reĝimo kaj kie la militambicio estus sufokinta ĉiujn homajn sentojn. La rezulto de tiu simpla rezonado kompreneble estas : "for la ŝtatabsolutismo, kiu estas la komenco de ĉiuj krimoj; vivu la libereco kaj la demokratio". La komprenenhavo de tiuj lastaj vortoj ne estas difinita pli detale : ĝi esprimas spontanan reakcion kaj malaprobon de la hitleraj agomanieroj. Ĉiu helpensanta homo tamen subite devus rimarki ke la radikoj de la malbono, kiun oni volas kontraùbatali troviĝas pli profunde : tio alportas do malgrandan avantaĝon ke oni nur la eksteran kreskadon de la herbaĉo fortiru dum ke la radikoj restas en la tero; post mallonga tempo ili naskas novajn foliojn kaj fruktojn. En la moderna kulturo estas profunda vundo, kies simptomoj estas rimarkeblaj ne nur en Germanujo, sed ankaù en nia kaj en la najbaraj landoj; pro la milito enformiĝis en Germanujo pli akra tiu malsaneco; tio tamen ne signifas ke la aliaj popoloj, per mi ne scias kiuj antaùrimedaj kuraciloj, estis netuŝebligitaj. Ni volas diri : la malvaloriĝo de la homo, la fakto ke homo ne plu estas konsiderata ento kiu ververe estas lokigita en la mondo kaj kiu estas ligita al ĝi per sennombraj fibroj, sed kiu tamen estas pli ol peco de materio, determinata per la ĉirkaùaĵoj, ento kiu estas sendependa de la aĵoj, ĉar li estas spirito, kies agado havas supermaterian helecon kaj tial precize pro tio priregas la realecon, laù la parolo de G. Gezelle :

Mi estas spirit' estas reĝ', regas la universon,
Mi estas nobla, potenca, mi ordonas;

tiu malvalориĝo de la homo unue estas rimarkata en la prijuĝoj kaj kritikoj, kiujn la homoj esprimas pri la konduto, la sintenado kaj la karaktero de la aliaj. Estas ja iu nombro de ecoj, kiuj apartenas al la plej noblaj klopodoj de la homa persono, kaj kiuj estas konsiderataj pli kaj pli kiel neatingeblaj kaj neeblaj idealoj. La morala kaj religia vivo estas pli kaj pli prezentata kiel ekstera formaleco, ege kontraŭa al la internaj penoj de la homo.

La virtema homo estus do tiu, kiu kapablas konduti laŭ ekstera formaleco, konforme al la malindulgaj tradicioj kaj malmulte tolerantaj opinioj de la ĉirkaŭaĵo, sed kiu tute ne harmonias kun lia animstato. Eĉ tiam, kiam homo sincere klopodas akordigi sian internon kun sia ekstera konduto, ne estas forigita tiu dueco; la virtema vivo ja enhavas ion nenaturan, ĉar oni klopodas ion, kio ne estas ankoraŭ atingata kaj oni tiel sintenas kontraŭe al la naturaj emoj de sia esenco. Tiu estas la tezo, kiun prezentas A. Gide en sia libro "L'école des femmes" per nesimila ruzeco. La logika konkludo de tiu libro, kiel ankaŭ de lia libro "L'Immoraliste" estas insisto al la pure natura vivo sen iu morala aŭ religia maltrankviliĝo. "Jenseits von Gut und Böse".(Nietsche) ĉar relegio kaj mondo, eĉ dum ĝiaj plej noblaj efektiviĝoj, estus nur sincera nenatureco, ili devas esti indikataj kiel malavantaĝaj devojiĝoj . Tie, kie Nietsche precipe fiksas la atenton je la vanaj sonĝoj de la "jenseits" dum ke oni lasas forgliti valorojn de la "diesseits" Gide do pli akcentigas la nenaturan kaj malfeliĉigan duocon, kiu ekestas en la homa vivo pro la penado al la virto. Aliaj, kiel Simone de Beauvoir en "Pyrrhus et Cinéas", indikas pli la neatingeblon de certaj vivkondutoj : neprofita dediĉo al idealo aŭ al certaj homoj, ne eblas laŭ tiu moderna aŭtorino, ĉar en dediĉagoj estas gvidata per personaj opinioj pri la bono kaj malbono por iu persono, tiu agomaniero povas esti resumata kiel trudo de propra opinio al aliaj; patro, kiu malpermesas al infano, ke ĝi ludu, por ke ĝi okupu sin por la studado, nomas sian agon nobla dediĉo, dum ĝi laŭ S. de Beauvoir, estas nur tirana encerbigo de liaj opinioj. La neprofitamo de la dediĉo devas do esti markata kiel vana vorto, ĉar ŝajnas neeble ke oni fiksas la objektivan bonon en neerarpovaj limoj.

Kune kun tiuj pure filozofiaj konsideroj, kiuj detruas la fundamentojn de la morala vivo, estas ankoraŭ la sportoj de la eksperimenta-psikologio kiuj donis pli profundan enviđnovon en la kunmeto de la homa animvivo kaj kiuj precipe malkovris la multajn devojiĝojn kiuj okazis ĉi-tie. ĉiuj tiuj ideoj pli kaj pli trudiĝas al la popolo. Pro la fakto mem, ankaŭ la kunligoj de tiuj opinioj iĝas pli simplaj. Sekvo de tio estas ke ne nur la homoj de nia tempo estas pli kritikemaj al la vortoj kaj la kondutoj de siaj proksimuloj, sed ke la homkonsidero, kiun ili havas, suferis iun malvaloriĝon. La homo estas pli kaj pli konsiderata kiel eta sensignifa estaĵeto, kiu perdiĝas en la senfineco de la terglobo; brilo de kelkaj momentoj inter la senfineco de la estinteco kaj de la estonteco; estaĵo, kun grandaj deziroj kaj malgrandaj ebloj, kiu devas sin submeti fatale al la batoj de la forto; peco da materio kiu estas hela por si mem kaj komprenas sian malfeliĉon per tiu diafana klareco.

ĉiuj tiuj opinioj estas kompreneble helpataj de la multaj moralaj devojiĝoj en nia tempo, per kiuj la homo malnobliĝas ne nur en la okuloj de la aliaj sed ankaŭ por si mem. Tiom da pasioj kaj malgajaj vivoj ŝajnas ververe doni ĉiutagan konfirmon al la senpoveco de la homo kontraŭ la brulanta fajro de liaj pasioj.

Se estas vere ke la literaturo estas spegulo de certa tempo, ekmontriĝas per tio kiun progreson jam faris la malvaloriĝo de la homo. La libroj, kiuj momente estas plejparte legataj, apartenas al la speco de la romanliteraturo, kiu prezentas pli malpli delikatan analizon de amaventuro. Tiu temo montriĝas en la plej granda parto de la filmoj. Pro la monotoneco de tiu senfine ripetata gvidtemo ni ne volos klarigi; oni ofte ekhavas la impreson ke tiu speco alproksimiĝas elĉerpiĝon

kaj ke povas esti serĉata al iu ŝanĝiĝo kaj renoviĝo. Kio tamen nin precipe maltrankviligas, estas la homoj kiuj estas prezentataj en tiuj libroj kaj filmoj; kia honorbildo espriniĝas el la produktoj de la moderna literaturo ! Tie povas esti farata grava eksperimento; valorus ja la penon iam aranĝi galerion prezentado de la ĉefaj personoj, kiujn montras la modernaj romanoj. Ni opinias ke tiu grandioza ekspozicio de la figuroj el nia nuna literaturo ne oferos tre optimistan aspekton : la homoj el la romanoj de François Mauriac je la malgajaj pasioj, kiuj antaŭenpelis ilin; la malgajaj viroj de Maxence Vander Meersch, André Maurois, André Gide, Jean-Paul Sartre, Simone de Beauvoir, Albert Camus prezentas al ni sinsekvadon de malfortaj homoj, kiuj estas forpelitaj sur la neregita Pasioceano. Nia flandra literaturo certe ne montras la malmoralan vivobildon, kiu renkontriĝas ĉe la francaj aŭtoroj; tamen ankaŭ tie-ĉi ni trovas tiom da homa malnobleco kaj malforteco; pli kaj pli iĝas malofteco ekhavi libron, plena de viva freŝo, kiel "Hollands Glorie" de Jan de Hartog kaj "Menschen en God" de Pieter Vander Meer. Kelkaj rimarkis ke la prezentado de malgajaj vivoj, de nenormalaj cirkonstancoj iĝis en nia tempo modo, kiu ne estas konforma al la realo de la ĉiutaga vivo. Tio povas esti vera, sed ankaŭ tiu modo devas esti klarigata; kial ja ĝuste tiu modo trapenetris kaj kial tiuj verkoj estas produktitaj kaj legataj pli ol la aliaj ? Se la artisto estas iu, kiu pli delikate sentas kaj pli profunde spertas la vivrealecon, ni trovas tie-ĉi ekscitantan ateston pri la malvaloriĝo de la homa personeco. Ni ne kredas ke ni trograndigas se ni diras ke la literaturo estas impertinenta ekspozicio de homa malgrandeco kaj moralo-malvaloriĝo.

La samon ni povas diri pri la multaj historiaj romanoj, kiuj emegas atentigi pri la malgrandaĵoj, ankaŭ de niaj plej grandaj figuroj el la historio; tio-ĉi je preteksto de konigi la internan vivon de tiuj-ĉi homoj.

Tie, kie oni antaŭe emis akcentigi la fortajn efektiviĝojn de certaj homoj, oni nun pli serĉas la malgrandajn homajn maltrankviliĝojn, kiuj ankaŭ estas renkontataj en ili. Tie-ĉi oni povas apliki la konitan kritikon, kiun skribis Frederik Van Eeden kontraŭ Lodewijk Van Deysel, laŭ kiu li kulpigas tiun lastan ke li ne tre interesiĝas pri la serena lukso de la akvolilio, kiu tiel paceme kuŝigas siajn florkalikojn kaj foliojn sur la ebena akvosurfaco, kaj ke li daŭre serĉas la nodajn tigojn kaj harajn radikojn, kiuj estas kaŝataj en la ŝlima lagettero.

La nuntempaj homoj ankaŭ ne plu toleras la trankvilan harmonion kaj noblan grandecon, kiuj radias el certaj viroj; ili daŭre serĉas la malgrandajn mankojn, kiuj ankaŭ malornamis la plej belajn homojn. La samon mi povas diri rilate al la giganta sukceso, kiun kelkaj semajnaj gazetoj akiris, nur celante malpurigi kelkajn konitajn nomojn kaj rakonti malbonaĵojn pri eminentaj personoj.

La malvaloriĝo de la homo aplikiĝas treefike en la praktikoj, kiuj jam estis propaganditaj antaŭ la milito, sed kiuj akiris precipe dum la milito, ampleksan disvastiĝon. Estas sufiĉe konita ke multaj Germanaj soldatoj posedis narkotaĵojn, kiujn ili povis uzi dum grava vundado, kaj kiuj estis destinitaj por ĉesigi la vivon laŭ dolĉa maniero; la saman metodon oni uzis por liberigi la komunon de kelkaj malutilaj elementoj, kiel la malsankapuloj kaj la malfortkapuloj. Multaj ne plu vidis en tio maljustan atencon kontraŭ la vivo, kiu estis donacata de la Dia Providenco; tiu praktiko estis prezentata en skribaĵoj kaj filmoj, inter alia, la konata filmo "Ich klage an", kiu ankaŭ en nia lando preskaŭ ĉie estis montrata - kiel permesita forkuro de la sufero. La moderna hedonismo eĉ pli ŝatis malposedi la vivon ol konsenti kuraĝe al suferplena ekzisto. Tial ankaŭ la peza timsento, kiu regas tiel la modernan literaturon kiel la nuntempan filozofion; la homo sentas kvazaŭ li estus frakasita inter la agitado de la kosmaj okazintaĵoj : tio estas la fundamenta ideo en la filozofia pensado ĉe Martin Heidegger kaj J. P. Sartre.

(daŭrigota)

# ANGULO DE LA ŜERĈEMULOJ.

-_-_-_-_-_-_-_-_-_-_-_-_-

## LITERMIKSAĴENIGMO.

La unua kaj tria vicoj de difinoj estas ĉiuj 3 literaj substantivoj (radikvortoj aŭ kompletaj vortoj laŭ difino). La meza vico konsistas el 6 literaj substantivoj. Intermiksante la literojn de la 2 triliteraj substantivoj, oni kapablas formi la sesliteran substantivon. Ankaŭ inverse se oni trovis la mezan vorton oni kapablas formi la 2 triliterajn substantivojn per intermiksado de la literoj de la seslitera vorto. La unuaj literoj de la sesliteraj vortoj de 1 ĝis 35, formas proverbon.

Ekz. : la difinoj : 1. birdo (R) - antikva reĝo(R) - fundo (R)
la solvoj : 1. ara' - faraon' - fon'

Oni do demandas : 1. la 70 triliteraj substantivoj.
2. la 35 sesliteraj substantivoj.
3. la proverbo.

Kaj jen la difinoj.

| | 1-a vico | meza vico | 3-a vico |
|---|---|---|---|
| 1. | -klara skribaĵo(R) | -danĝera rabobesto(R) | -legomo kun manĝebla radiko |
| 2. | -planedo (R) | -malpeza plumaro | -faro |
| 3. | -nerva muskolkuntiro (R) | -malsano | -parteto |
| 4. | -vestaĵo (R) | -metalo | -rimeno (R) |
| 5. | -virino | -konstelacio | -metalo |
| 6. | -alta herbo | -dolĉa suko (R) | -kaptilo (R) |
| 7. | -ludkarto | -lernolibro | -plata lignopeco (R) |
| 8. | -gento (R) | -eklezjulo | -kaserolo (R) |
| 9. | -trinkilo (R) | -pruvsigno | -trikaĵo |
| 10. | -plata marfiŝo (R) | -tiu, kiu loĝas apud alia (R) | -agO sin meti en akvo (R) |
| 11. | -metalo | -paroladisto (R) | -rodulo (R) |
| 12. | -konstruaĵo (R) | -vestaĵo (R) | -malsaneto (R) |
| 13. | -frukto (R) | -meblostilo | -inklino |
| 14. | -kurblinio (R) | -speco de drogo(R) | -skriba resumo (R) |
| 15. | -mola hararo (R) | -granda mambesto | -volplenumo (R) |
| 16. | -aspiro (R) | -haŭtŝvelaĵo | -sovaĝa bovo |
| 17. | -relegia ceremoniaro (R) | -severa estro | -membro |
| 18. | -plenda ekkrio | -grada aliformiĝo | -homo |
| 19. | -familiano | -abismo | -interna korpparto (R) |
| 20. | -unuo de elektra kontraŭstaro | -plibeligaĵo | -amfibio (R) |
| 21. | -interna korpparto(R) | -diaĵa respondo (R) | -parto de konstruaĵo |
| 22. | -planedo (R) | -profesortitolo (R) | -korpparto (R) |
| 23. | -parto de veturilo(R) | -morta korpo (R) | -malpleno (R) |
| 24. | -faro | -birdo (R) | -cilindro (R) |
| 25. | -brusto (R) | -instigo (R) | -parto de spaco (R) |
| 26. | -mitologia figuro | -prezopropono | -taĉmento (R) |
| 27. | -entuziasmo (R) | -marfiŝeto (R) | -speco de sidilo (R) |
| 28. | -monato (R) | -speco de glazuro | -fluidaĵo (R) |
| 29. | -membro | -apenaŭ sentebla diferenco | -malgranda mezurunuo de pezo (R) |
| 30. | -rodulo (R) | -blua farbo (R) | -malmoliĝinta haŭto (R) |
| 31. | -ĉeso (R) | -sciigo (R) | -vivmaniero de popolo(R) |
| 32. | -arbo (R) | -speco de mikrobo | -malnova mezuro de longeco (R) |
| 33. | -parto dd flugilo(R) | -taĉmento por gardi aŭ honori iun | -planedo (R) |
| 34. | -diafana likvaĵo (R) | -speco de enigmo | -naĝbarelo |
| 35. | -marŝo | -okulkavo | -piedvesto (R) |

vidu rimarkojn : paĝo 5.

Rimarkoj : De la enigmo el maja numero, mi nur ricevis 2 solvojn. Komprenéble ĉar la enigmo estis tre malfacila. Sed kial ne ensendi la facilega enigmo el junia revuo ? Nur 3 solvoj envenis. Nur du gemembroj ekde januaro regule ensendis : R. Lauwers kaj R. Jurion. Sekvas Spruytte kaj Roels kun 3 ensendoj. La aliaj malpli aŭ eĉ tute ne. Post junio la klasifikado estas jena : 52 p. Rosa Jurion (ricevas premion kaj daŭrigas per 2 puntoj); 45-1/2 p. Roger Lauwers; 30 p. Spruytte (el nur 3 ensendoj); 27-1/2 p. Roels J.; 19 p. M.Th. Roose.

Mi esperas ricevi multajn ensendojn de la ĉi-supra enigmo ĉar ĝi estas interesa kaj cetere estas libera tempo por multaj el niaj gemembroj.

Rubrikprizorganto : Iserentant Roger.

---

B O T A N I K O - Septembro.

Cie oni trovas kardojn laŭ longe de fervojoj, riveretoj, en la arbaro, ĉie.

La plej ofta estas la Akkerdistel (Cirsium arvense -Kamparkardo), kun grandaj floroj sed sen dornoj sur la trunko.

En la terpomlando oni ĉie trovas la "zwarte nachtschade" (Solanum Nigrum) kun blankaj floretoj, kiu tre similas al terpomfloro.

La floroj iĝas poste nigraj riboj kiuj ege estas venenaj, kiel la tuta familio de la solanacoj. (ankaŭ la terpomo estas venena, escepte la tubero).

Tipa estas ke la plantoj kiuj kreskas sur sablaj, sekaj terenoj estas konfirmigitaj al la eksteraj cirkonstancoj.

La "Havikskruid" (Hieracium) rulas sian foliaron kiam estas brilega sunlumo tiel ke la hara subflanko de la folioj estas direktita al la lumo; sekve de tio la vaporiĝo multe malpliiĝas.

La "Hertshooi" (Hypericum) sekvas alian vojon. La folioj de tiu planto ŝajnas esti traboritaj de centoj da truoj sed tiuj truoj estas gutoj da oleo. Kiam estas varmega tiu oleo vaporiĝas, kaj restas ĉirkaŭ la planto sekve de kio la planto ne plu perdas akvon. Tiu oleo ankaŭ protektas la planton, kontraŭ la brutaro aŭ aliaj plantmanĝantaj bestoj.

Ankaŭ planto kiu ne lasas vaporiĝi multe estas la "Muurpeper" (Murpipro - Pedum Acre). Laŭ la nomo oni povas rimarki ke ĝi ne multe bezonas por kreski, eĉ sur malnovaj muroj ĝi kreskas kaj floradas. Por la dua nomo vi nur devas preni foje pecon de tiu planto kaj mordi sur ĝi, vi tiam baldaŭ gustos la similon inter la planto kaj pipro. Tial la brutaro ĝin lasas trankvila.

Tie kie la planto kreskas la radikoj plivastiĝas sed tamen ne ankoraŭ sufiĉas por la tuta planto. Tial ekestas ĉe la dividiĝoj multe da krom-radikoj kiuj zorgas por la alia parto de la planto.

Daŭrigota. Verkis G. Bruyneel.

---

Slechts op u i t d r u k k e l i j k verzoek van Uwentwege zal ik U een bezoek brengen.

Zonder enige verplichting van Uwentwege, bekomt U s c h r i f t e l i j k alle inlichtingen nopens voorwaarden, tarieven, enz...

Algemene Verzekeringen van Triëste,
R. Witvoet - De Kersgieter,
Baron Ruzettelaan, 102,
ASSEBROEK-BRUGGE.

En la I-a numero de la nova gazeto "Internacia E° servo de Aùstrio" ni trovas la ĉi-sekvantan interesaĵon :

AUSTRIAJ SALMINISTOJ SAVIS LA ARTAJN VERKOJN DE EUROPO !

En kunsido de aùstria parlamento la socialista deputito Geiswinkler raportis pri la savado de eùropaj art-kaj kultur-verkoj, savitaj de la salministoj de Aussee antaù intencita detruo.

Kiam la germana armeo atingis la kulminacion de sia potenco k la naciistoj en Berlino opiniis jam estis venkintoj, ili rabis el tuta Eùropo la plej valorajn artaĵojn. En la grandegaj salminejoj de Sandling-monto inter Loser k Dachstein ili farigis egajn kaŝejojn k la ŝarĝoj de pli ol mil veturiloj, plenaj de multegaj kulturtrezoroj el ĉiuj landoj, malaperis en la profundegoj de la praminejo. Pli ol 6.000 neanstataŭigeblaj bildoj, oraĵoj, valoraj tapiŝoj, malnovaj manuskriptoj, bibliotekoj, antikvaj mebloj, praskribaĵoj ktp. tie estis kaŝitaj.

Sed kiam la germanaj faŝistoj ekkonis, ke ili perdis sian potencon, la nacisocialista landestro Eigruber ordonis : la salmonto devas esti eksplode detruota, la artaj trezoroj de Eùropo ne venu en la manojn de la aliancanoj.

Speciala eksplod-taĉmento tien estis sendata k ok misteraj kestegoj, mil funtojn pezaj, estis transportataj en la monton. La surskribo de ili estis : "Marmoro ! Atentu, ne faligu ĝin!" Fakte en ili estis aerminoj. Se la plano de landestro Eigruber estus sukcesinta, Eùropo estus perdinta por ĉiam grandegan parton de siaj artaj k kulturaj valoraĵoj k Aùstrio sian salmonton.

Sed kiam la danĝero estis plej granda, nokte la salministoj sub gvidado de profesoro d-ro Michel k inĝeniero Eder trenis la plej valorajn kulturaĵojn en la plej profundan koridoron de la salmonto por ke ili eble estu konservotaj por la ordonita eksplodigo. Pli ol tricent ŝtupojn malsupren ili devis porti la ŝarĝojn! Sub risko de sia propra vivo la laboristoj savis per penega k danĝera laboro inter alie por Belgio ankaù la mondfaman altaron de Gent. Neniam antaùe en la historio estis pli glorata la granda flandro Van Eyck ol en Aùstrio en la Aprila nokto de la sorta jaro 1945. Alia laborista grupo fortransportis en la kestegoj la aerminojn. Ĉi tiuj grandegaj bomboj hodiaù kuŝas sur la fundo de la lago de la urbeto Aussee.

Ankoraùfoje ordonis Eigruber detrui la bildojn k verkojn per flamĵetiloj. Sed simplaj homoj faris nokte 53 bortruojn per eksploddetrui la enirejojn al la minejo la 3-an de Majo 1945.

Kiam alproksimiĝis la soldatoj por plenumi la frenezan ordonon de Eigruber, aùdiĝis obtuza detonado k la minejo eniro renversiĝis. Ĝojkrioj iris tra la vicoj de la salministoj ! Verkoj en valoro de milionoj estis savitaj. Eùropo ricevis siajn kultur-trezorojn k por Aùstrio konserviĝis sia praa salmonto. La 9-an de Majo venis la unuaj taĉmentoj amerikaj al Aussee.

De tiam neniu plu parolis vorton pri ĉi tiuj silentaj herooj de la laboro. Sed ni neniam forgesu la obtuze tondran detonadon de la 3-a de Majo 1945, per kiu simplaj laboristoj savis la plej valorajn kultur-trezorojn de Eùropo k la honoron de Aùstrio.

(Esperanto dissendado de Radio Vieno, voĉlegita de k-do Vokal.)

-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-

O P I N I O kiun ni S U B S T R E K A S !

M(ason) S(tuttard) en "Esperanto" - Julio 1947 - p.99 :

"Uzi elizion sekve de la malfacileco de ritmofarado en Esperanto, sed ne fronti al la problemo kaj solvi ĝin sen enkonduko de mallongaj neologismoj, estis laù mi unu el la plej hontindaj malvenkoj ĉe la Esperanto-literaturo".

- - - - - - - - - - -

Beste Thérèse, Dit artikel afdrukken: kopij is niet nodig!

## G R A N D A   A V A N T A Ĝ O
### kiu havas ankaŭ
### G R A N D A N   M A L A V A N T A Ĝ O N.

Oni povas, en iu senco, diri ke per E° ni multe pli povas atingi ol per kiu ajn alia, nacia lingvo, eĉ la angla.
Ĝi estas la organizo de la E° movado kiu faras tion. Ni tion montros nun kaj donos kelkajn ekzemplojn. Per la multaj adresaroj kaj la anoncoj oni povas kontaktpreni kun la tuta mondo. Laŭ tiu maniero oni kapablas facile havi plej diversajn sciindaĵojn kaj informojn pri iu lando kaj la eniro en ĝi estas ankaŭ plifaciligita. Eksterlandaj esperantistoj tre ofte loĝas ĉe gesamideanoj aŭ en E° hotelo aŭ almenaŭ en iu hotelo rekomendita de esperantistoj. Plej ofte ili povas fari vizitojn je gvidado de iu loka samideano. Generale tio havas ankaŭ financajn avantaĝojn. Kiam esperantisto volas aĉeti libron, li mendas tion ĉe iu E° instituto. Tiamaniere li subtenas nian aferon kaj ankaŭ li estas certa ke li havos la libron laŭ plej eble malmultekosta prezo. Mi ekz. ankoraŭ memoras ĵus antaŭ la milito la belegan romanserion, eldonitan de la Federacio de Laboristaj Esperantistoj de Nederlando, kiu ; unue estis malpli kosta ol ekz. la Nederlandlingva "Fenix" serio, kaj due pli bele prezentita ol tiu lasta serio. Tiuj ekzemploj sufiĉas. Jen estas tre gravaj avantaĝoj pri kiuj oni devas bone atentigi la varbotojn.
Kaj nun la granda malavantaĝo : tiamaniere la tuta E° movado restas interna, izolita rondo; ĝi ne venas al la ekstera mondo. Estas tial ke ekz. ĉiuj librovendistoj diras : "al mi ankoraŭ neniu persono iam demandis E° libron" kaj do konkludas ke E° estas tre malmulte praktikata. Estas tial ke preskaŭ ĉiuj hotelestroj, informservoj, ktp. diras ke ankoraŭ neniu alparolis ilin en E°; tial ke la organizoj de gvidistoj turistaj + neniam estas pridemandataj por gvidi en Esperanto lingvo. Kaj nun la grava demando: kiamaniere trovi solvon? Kiamaniere harmoniigi tiujn du ŝajne ne harmoniigeblajn faktorojn: doni profitojn al tiuj kiuj eniras nian movadon kaj samtempe penetrigi niajn efektivigojn en la eksteresperantista mondo!

-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-

Drs Fernand Roose (Brugge)

## W i s t   g e ?

- dat de Aarde reeds gefotografeerd werd van op meer dan IOO.OOO m. hoogte ?
- dat aan de Zuidpool gedurende de Zomerperiode de stratosfeer op IO.OOO m. begint, maar gedurende de winter zakt tot op 900 meter ?
- dat een <u>LEVENSVERZEKERING</u> het mooiste geschenk is dat men zijn echtgenoote kan aanbieden ?

Het beteekent V E I L I G H E I D en Z E K E R H E I D !

Algemeene Verzekering van Triëste.

Roger Witvoet,
Baron Ruzettelaan,IO2,
Assebroek.

!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!

GESAMIDEANOJ : Por riparado de viaj ŝuoj, nur unu adreso :

HUBERT VAN ROOSEBEKE - Calvariebergstraat, 8, Brugge.

5 % da rabato !